

La 20-a Ekumena Esperanto-Kongreso en Italio

Oldřich Arnošt Fischer kaj Gabriella Stier

Prelego por Societo por la internacia lingvo Esperanto en Brno-Kohoutovice,
la 15-an de oktobro 2014

Komuna kongreso de Kristana Esperantista Ligo Internacia (KELI) kaj Internacia Katolika Unuiĝo Esperantista (IKUE) – ekumena kongreso – okazis en Centro Mariapoli de Chiara Lubich en Cadine apud Trento la 16-23 de aŭgusto 2014. Inter 69 partoprenantoj el 15 landoj (Aŭstrio, Belgio, Ĉeĥio, Estonio, Francio, Germanio, Hungario, Italio, Kroatio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio kaj Svisio) estis ankaŭ kvin infanoj. Ĉeĥan Respublikon reprezentis Miloslav Šváček, Pavel Polnický, Václav Pospíšil, Petr Chrdle kaj Oldřich Arnošt Fischer.

Temo de la kongreso estis demando: „Ĉu Kristo estas dividita?“ Tiel demandis apostolo Paŭlo en sia unua letero al Korintanoj (1 Korintanoj 1, 13). Korinthos estas greka urbo en nordo de Peloponesa duoninsulo. Ĝi estis signifa urbo de Romiana imperio, kie loĝis 500 mil homoj; du trionoj de ili estis sklavo. Sankta Paŭlo estis informita, ke novaj kristanoj estas influitaj per helenismo, ne vivas bone kaj dubas pri la kredo. Tial apostolo Paŭlo sendis al Korintanoj sian leteron en la jaro 57.

Urbo Trento situas en norda Italio. Ni veturis perbuse el Brno trans Bohemio, Germanio kaj Aŭstrio. Matene ni atingis aŭstra-italan limon en Brennero. Tio jam estis Tirolo kun grandaj montoj, arbaroj, paŝtejoj. Pitoreskaj burgoj sur montetoj kaj submontaraj vilaĝoj, kies preĝejoj havas altajn konusformajn turojn, estis belegaj.

En Trento atendis nin loka esperantistino Norma Covelli Cescotti kaj slovaka ikueano Pavol Petrík. Post unu horo, kiam formigis pli granda grupo de partoprenantoj de la kongreso, ni kontinuus veturadon per loka buso en vilaĝon Cadine, kiu situas ĉirkaŭ 5 km de Trento. Kongresejo situas en Centro Mariapoli de Chiara Lubich, kiu estis konstruita sur monteto.

Estro de IKUE, sinjoro Giovanni Daminelli, helpis al ni kun valizoj. Ni ricevis ŝlosilojn de niaj ĉambroj, nomslipojn kaj verdajn tekojn kun multe da informiloj en akceptejo. Kelkaj dokumentoj estis en itala lingvo, sed plimulte esperantigitaj.

Sinjinorino Annalisa Pacchetti montris al ni filmon pri Chiara Lubich (1920 – 2008), kristana perantino, kiu fondis katolikan pacan „Movadon de Fajrujoj“ (itale „Movimento dei Focolari“) en la jaro 1943. La movado tre influis ankaŭ eklezion en nia lando: la fokolarano estis ekzemple eksa prezidanto de kristana-demokrata Popola Partio (KDU-ČSL) Josef Lux (1956 – 1999).

Romkatolika episkopo de diocezo Trento Monsinjoro Luigi Bressan vizitis nin kaj deziris al ni sukcesan kongreson kaj utilajn spiritajn travivaĵojn en Centro Mariapoli kaj Trento.

Zorgo de gesamideanoj de Esperantista Klubo en Trento, precipe Norma Covelli Cescotti, Giovanni Daminelli, Pierluigi Svaldi kaj Carlo Sarandrea, laborantoj de la centro, pastroj Bernhard Eichkorn, Albrecht Kronenberger, pastoro Wolfram Rohloff kaj muzikisto Stefan Lepping kune kun entuziasmo de ĉiuj kreis etoson de amikeco kaj interkompreno.

Ĉiu havis la Sanktan Biblion kaj kantaronojn „Adoru“. Tago komencis per romkatolika kaj ekumena diservoj, post matenmanĝo ni kantis subgvide Stefan Lepping, kies energion kaj sinoferemon ni tre admiris. Danke al li, ni ofte kantis.

Norma Covelli Cescotti tralegis tekston de prelego pri Tridenta Koncilio (1545-1563). Tiu multjara koncilio ne plenumis sian celon fari konkordon inter kristanoj.

Petr Chrdle interese prelegis pri Přemysl Pitter kaj prezentis libron „Heroo de amo“ de Karel Kraft. Přemysl Pitter (1895 – 1976) studis tipografian, ekonomian kaj libropresajn lernejojn en Prago. Li volonte soldatiĝis en la jaro 1914, sed ne volis mortigi homojn kaj dufoje fuĝis el la batalejo. Post la unua mondmilito li ekstudis teologion, sed post du semestroj li preferis praktikan kristanismon. Li realigis la unuajn edukajn kontaktojn kun malzorgata junularo en la jaroj 1920-1921. Li okupiĝis pri porpaca laboro, fondis spiritan kaj etikan movadon „Nova Jerusalemo“, laboris kun junularo. Li fondis ankaŭ Milič-domon (Jan Milič el Kroměříž (1320-1325? – 1374) estis kritikisto de romkatolika eklezio, antaŭlo de Magistro Jan Hus (1371? – 1415)) kaj sanigejon „Domov“ („Hejmo“). Dum la jaroj 1924-1941 li kaj verkistino Pavla Moudrá (1861-1940) eldonis la gazeton „Sbratření“ („Kunfratigo“) kun humanismaj temoj, pri paca movado kaj religio. Li fariĝis sekretario de „Movado por Kristana komunismo“ en la jaro 1926. Dum la dua mondmilito li helpis al moravianoj, silezianoj, ĉeĥoj, slovakoj, judoj kaj germanoj. Li koncentriĝis ĉiujn siajn fortojn por atentigi pri la danĝero de komunismo. Li fuĝis el Ĉeĥoslovakio en okcidentan Eŭropon (1951) kaj neniam plu revenis en sian hejmlandon. Li kunlaboris kun BBC kaj kun la „Radio Libera Eŭropo“, publikadigis artikolojn pri aktualaj problemoj. Li mortis en Zuriko.

Siegfried Krüger prelegis pri komenciĝo de la unua mondmilito, sed ankaŭ pri detruo de urboj Coventry kaj Drezdeno dum la dua mondmilito.

Krome libro pri Přemysl Pitter („Heroo de amo“) ni aĉetis librojn de Bent Jesenius „Bonvenu en nia mondo“ – pri nuntempa esperantista movado – kaj de Gerrit Berveling „Konciza historio de kristanismo“ en libroservo.

La ekskursoj donis al ni neforgeseblajn travivaĵojn.

Sur monto apud urbo Rovereto ni vidis la amason de flagoj el diversaj landoj, heroldas la pacosopiron de la popoloj. Ni rigardis la sonorilegon kunfanditan el kanontuboj, kiu esprimas volon de homaro neniam plu okazu militi. Metalon por tiu Sonorilo de la Militfalintoj, nomata „Maria Dolens“, donis 19 landojn, kies soldatoj batalis en la unua mondmilito. Soklo de la sonorilo pezas 10,3 t. La sonorilo, kies frapilo pezas 600 kg, pezas 22,639 t. Ĝi estas 3,36 m alta havante diametron 3,21 m. La sonorilo estis fandita en Trento la 30-an de oktobro 1924. Sur la sonorilo estas gravuritaj la aŭtografoj de la papoj Pio la 12-a: („Nenio estas perdita kun la Paco. Ĉio povas esti perdita kun la milito.“) kaj Johano la 23-a („Por homa paco estas necesa konkordo kaj trankvila libereco.“)

Vizito de la Sanktejo de Sankta Romedio, kiu estis konstruita sur alta montopinto profunde nin impresis.

Kortuŝis nin la 90-jara Éva Farkas-Tatár, kiu rakontante pri travivaĵoj de sia longa vivo varmigis niajn animojn.

Nia grupo ofte kantis. Kiam ni faris tuttagan ekskurson en nordtirolan urbon Merano, ni kantis ankaŭ en buso subgvide Stefan Lepping. Ĉiu havis kantareton Adoru en sia verda teko. Ni kantia ankaŭ en preĝejoj, kiujn ni vizitis.

Merano, kies multaj loĝantoj parolas germane, estas banloko kun palmoj sub montoj kovritaj per neĝo. Elizabeto Habsburga (Sissi) (1837-1898) akiris meriton pri progreso de la urbo sur bordoj de montara rivero Pasero.

Unu vesperon plibuntigis al ni muzika grupo „Il Tambore del Sole“ („Suna Tamburisto“), alian vesperon danca grupo „Brainstorm“ („Cerba Ŝtormo“).

Ni observis dum promeno en stratoj de vilaĝo Cadine ne nur lacertojn, sed ankaŭ bambuon, kivion kaj figarbojn. Mi trovis tie du mortajn skarabojn *Sitaris muralis* (Forster, 1771) de la familio Meloidae. Larvoj de tiu skarabo evoluas en nestoj de sovaĝaj abeloj de la genro *Anthophora*. (Tiu skaraba specio rare troviĝas ankaŭ en suda Moravio en Ĉeĥa Respubliko.)

Kongreso estas labora agado kaj tial okazis ankaŭ jarkunvenoj de IKUE kaj KELI. Komitatoj de ambaŭ sekcioj laboris aparte, sed la rezulto estis komuna: venonta ekumena kongreso okazos en Ŝtrasburgo en la jaro 2015.

Adiaŭa vespero estis belega. Familio Rohloff kun Joonatan Ojasild kantis kanton pri alaŭdeto. Petr Chrdle kaj Pavel Polnický ludis scenon de la dramo R.U.R. de Karel Čapek. Paola Ambrosetto di Serio kantis italan popolkanton pri funikularo. Ágnes Ráczkevy-Eötvös preparis por ni ludon kun numeroj. Geedzoj Chevalier kaj Philippe Cousson kantis pri bufoj.

La vizitoj en preĝejoj de la diversaj konfesioj (ortodoksa, juda, evangelia, romkatolika) kaj de la Ekumena Centro de Trento fortis nian konvinkiĝon, ke ni ĉiuj estas kreaĵoj same amataj de Dio.

Post la kongreso ni vizitis ankaŭ klubejon de Esperantista Klubo en Trento. La klubo estis fondita en la jaro 1914 kaj havas 25 klubanojn.

La Kongreso okazis laŭ grandioza ideo de la ekumenismo, en familia etoso. Ĝi estis tre sukcesa danke al organizantoj Giovanni Daminelli, Norma Covelli Cescotti, Pierluigi Svaldi kaj aliaj. Estis belaj momentoj, kiam ni preĝis kaj kantis kune, amikiĝis. Ne Kristo, sed nur homoj estas dividitaj. Katolikoj, nekatolikaj kaj aliaj kredantoj (eĉ ankaŭ nekredantoj) estas infanoj de unu Dio.

Referencoj

- AŬTORA KOLEKTIVO (2006): Biblio. La Malnova Testamento tradukita de Ludoviko Lazaro Zamenhof kun la Duonkanonaj Libroj tradukitaj de Gerrit Berveling. La Nova Testamento tradukita de la Brita Komitato (John Cyprian Bust, B. Beveridge, C.G. Wilkinson). 1-a eld., IKUE kaj KELI, Dobřichovice, Kava-Pech, 1376 paĝoj.
- BERVELING, G. (2014): Konciza historio de kristanismo. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 88 paĝoj.
- CESCOTTI, N.C. & SVALDI, P. (2014): Kongresa kajero: 20-a Ekumena Esperanto-Kongreso. 1-a eld., Trento, Associazione Esperantista Trentina, 49 paĝoj.
- CESCOTTI, N.C. & SVALDI, P. (2014): Ekumena diservo. 1-a eld., Trento, Associazione Esperantista Trentina, 40 paĝoj.
- COUSSON, P. (2014): Ĉu la Eklezio estas dividita? – Dia Regno, 4: 75-77.
- FISCHER, O.A. (2014): Impresoj el la ekumena E-kongreso. – Starto, 3: 75.
- GABRIELLI, S. (1992): Trentino, Italio. Neĝo. 1-a eld., Trento, Instanco por la Turisma Reklamo de Trentino, 14 paĝoj.
- GABRIELLI, S. (1992): Trentino, Italio. Somero. 1-a eld., Trento, Instanco por la Turisma Reklamo de Trentino, 14 paĝoj.
- IKUE & KELI (2001): Adoru. Ekumena diserva libro. 1-a eld., Freiburg im Breisgau, Ponto, 1422 paĝoj.
- JENSENIUS, B. (2014): Bonvenon en nia mondo. Baza primovada lernolibro. 2-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 128 paĝoj.
- KRAFT, K. (2014): Heroo de amo. La vivo de Přemysl Pitter. 1-a eld., Dobřichovice, Kava-Pech, 194 paĝoj.
- KRÜGER, S. (2014): Memorigo al la komenciĝo de la unua mondmilito. – Dia Regno, 4: 78-79.
- POLNICKÝ, P., STAMM, S. & FISCHER, O.A. (2014): Protokolo de la jarkunveno de KELI, Trento, Italio, 19.8.2014. – Dia Regno, 4: 90-91.

RÁCZKEVY-EÖTVÖS, Á. (2014): Kongresa raporto de la ekumena kongreso en Cadine, Trento. – Dia Regno, 4: 83-89.

ŠVÁČEK, M. (2014): Dudeka ekumena E-kongreso. – Starto, 3: 74.

**Gabriella Stier kaj Miloslav Šváček en Brenero,
la 16-an de aŭgusto 2014**



Cadine



Centro Mariapoli de Chiara Lubich en Cadine



**Annalisa Pacchetti prezentas filmon pri Chiara Lubich,
ŝiajn vortojn esperantigas Carlo Sarandrea**



**Romkatolika episkopo de diocezo Trento Monsinjoro
Luigi Bressan**



**Ligna statuo de Virgulino Maria
en kapelo de Centro Mariapoli**



Stefan Lepping



Kantado laŭ kantareto Adoru (fratinoj Kirsch kaj Paola Giommoni)




Gabriella Stier kaj O.A. Fischer (fotis Václav Pospíšil)



Norma Covelli Cescotti legas prelegon pri Tridenta Konkilio (1545 – 1563)



Sonorilo Maria Dolens en Rovereto



Surroka sanktejo de Sankta Remedjo



Franciskano Pierluigi Svaldi, esperantisto



Veturado en sudtirolean urbon Merano



Kolonado en Merano



**Statuo de Elizabeto Habsburga (1837 – 1898, Sissi)
kaj Gabriella Stier en Merano**



En sinagogo en Merano



Merano, rivero Pasero



Tagmango en Merano



En Merano



Urba murego de Trento



Placo en Trento



Franciskana monaĥejo en Trento



Ekumena diservo en Trento



Éva Farkas-Tatár



Elisabeth Rohloff kun filinoj Theodora kaj Gloria,
Joonatan Ojasild




En stratoj de Cadine



Ciklameno eŭropa (*Cyclamen europaeum*)



Lacertoj



Komitato de KELI: Philippe Cousson, Pavel Polnický,
Ágnes Ráczkevy-Eötvös, Václav Pospíšil



Familio Rohloff kaj Joonatan Ojasild kantas pri alaŭdeto



Petr Chrdle kaj Pavel Polnický ludas scenon de R.U.R



Paola Ambrosetto di Serio kantas pri funikolaro



**Giovanni Daminelli, Norma Covelli Cescotti
kaj Pierluigi Svaldi**



**En esperantista klubejo en Trento
(Joonatan Ojasild kaj Endel Ojasild)**



**En esperantista klubejo en Trento
(Miloslav Švábek, Václav Pospíšil, Pavel Polnický, Pavol Petrik)**

